

Volume 1

FEBRUARY, 1907

Number 5

AMERIKA ESPERANTISTO


(AMERICAN ESPERANTIST)

A Monthly Journal of
ESPERANTO
the International Language



CHICAGO, U. S. A.

COPYRIGHT, 1907, BY ARTHUR BAKER



Amerika Esperantisto

Subscription, Per Year, One Dollar.

Jara Abono, Unu Dolaro.

MONTHLY JOURNAL OF THE INTERNATIONAL
LANGUAGE, ESPERANTO

American Esperantist Company,
1239 Michigan Boulevard, Chicago, U. S. A.

Publishers.

VOLUME 1 FEBRUARY, 1907 NUMBER 5

This number of *Esperantisto* greets you, after long delay, from Chicago. A detailed explanation of all the causes of the delay would be a recital too long for publication. Chief among them is the rapid growth of the movement for Esperanto, which has piled an enormous load of gratuitous labor upon the workers—I have frequently received as high as four or five hundred letters a week, and sometimes that many in a single day. Second, the lack of Esperanto printing facilities. This last has now been overcome, and this paragraph is set in our own type, still warm from the foundry. Our Esperanto text book will, we expect, be ready about June 15th. Most of the plates have been made and are now receiving final corrections. The journal is reduced in size to facilitate "catching up" with the calendar, and will soon be enlarged. Several persons who have ordered text books have also asked that their names be published in the correspondence department. Because we do not know which are Esperantists and which not, all are omitted until the Book is delivered. Do you feel like writing me a letter about your troubles? Think twice, and then use a postal card, with large characters. I'm working fourteen hours per day, as it is.—*La Redaktoro.*

PROFESORO MUNSTERBURG PRI UNU TUTMONDA
LINGVO.

DE SRO. WALTER B. STERRETT, WASHINGTON, PENN.

En la novembra McClure's aperis artikolo de Hugo Munsterberg (elparolata Mijnsterberh) profesoro de psikologio en Harvarda Universitato. La celo estas protesti kontraŭ la Simpligita Silabado de la angla. Komence, li citas la cirkuleron de la Silabada Konsilantaro: "Ciuj, kies propra lingvo estas la angla, kredas ke, se ĝi ne maljuste deteniĝos, ĝi iĝos la rega kaj internacia lingvo de la mondo. Je tiu ĉi sorto ĝi taŭgas pro sia uzo kiel la ilo de la plej larĝa komerco kaj la plej antaŭenpuŝa civilizacio, pro sia kosmopolita vor-

AMERIKA ESPERANTISTO

taro kaj pro sia gramatika simpleco. * * * Estas tamen disvasta kaj fortike subtenata opinio ke nia lingvo estas detenata en sia progreso al tiu fino per unu malhelpo kaj nur unu—sia malsimpla kaj nearanĝita silibado.” Car Silabada Reformo proponigas por ke oni gajnu internacionecon por la angla, la skribinto atakis la pli grandan aferon—la eblecon de tutmonda lingvo.

La temoj pretendataj estas: (a) nenia nacia lingvo povas internacie akceptiĝi; (b) Volapuk kaj Esperanto estas sensukcesaĵoj; (c) tutmonda parolilo ne estus utilaĵo; (d) simpatiemo estas la sola internacia lingvo. Pri tiuj kvar temoj mi volas trakti, sed nur pri la unua kaj la lasta en tiu ĉi artikolo.

La metodo de pensado de Profesoro Munsterberg kaj tiu de ĉiu esperantisto reciproke transkuras kiam li skribas la sekvantan paragrafon: “Kiam la Volapukuloj songis sian sonĝeton, kaj nun kiam la esperantaj revistoj kondukadas siajn tiel nomatajn internaciajn kunvenojn, ili apogis ĉiam sur unu fundamenta kredo kiu, ili diris, posedas certecon de aksiomo: ke la politika kaj ekonomia stato de la mondo civiliza malebligas ke la vivanta lingvo de unu lando fariĝu la internacia komunikilo de ĉiuj la aliaj. Kaj certege oni ne povas ataki la esperantan propagandon kiel multe koncernas tiun ĉi principon membriligan.”

Ĉe tiu loko de transkuro la Profesoro bone povus stari kiel nia standardtenisto. Esperantistoj amegas la pacon. Ni opinias ke la greka diskuris tra la tutan mondon pro la venkoj de Aleksandro, kaj la disvastigo de la latina sin ŝuldas al la militisteco de Romo. Ni ne estas tiaj songadantoj pri anglasaksona regnado kiaj kredas ke la glavo disvastigos la anglan al la fino de la tero. Oni ree povas citi nian nunan kunligaton ĉe Harvardo: “Oriente Azio kredeble daŭros per la ĥina lingvo, paroladata hodiaŭ de kvarcent milionoj, kaj per la japana; Sudameriko daŭros per la hispana; la cent dudek milionoj de Rusujo daŭros per la rusa; kaj eĉ la germana, franca kaj la aliaj eble ankoraŭ kontraŭstaros mallongtempe ĝis kiam ili estos ordigataj kun la lingvoj de la konusoformaj skriboj kiel mortintaj ekzempleroj.”

Sed tie ĉi ni disiĝas, ni dekstren, Sro. Hugo maldekstren; ni kun niaj signalvortoj; kaj sur lia standardo la sekanta: “Nenia internacia lingvo estas ebla escepte tiun de bonvol-eco”. Jen estu lia okazo sciigi al ni ion helpontan! Vidu ni kiel li ĝin faros—kiel Napoleono kuraĝiganta siajn partianojn per unu el tiuj malgrandaj ekscitaj paroloj aŭ kiel Don Kiĥoteo forrajdanta sur sia amuzajo depelota per ventmu-elilo?

AMERIKA ESPERANTISTO

La profesoro estas psikologiisto. Li argumentas ke tio, kion oni nomadas malgusta silabado, estas vere bona, ĉar ĝi li kontraŭstaras simplecon de la gramatiko: Ĉiu gramatikaĵo prezentas pli multajn stimulojn al la pensilo. Sammaniere devas esti antaŭenvenigata reege—kaj se du infanoj krias oni devige diras almenaŭ dufoje, per la substantivo kaj per la verbo, ke estas ne nur unu infano.” Cu tiu ĉi dogmo ke “la pensilo bezonas helpojn kaj proponetojn kaj lumojn de flankajn” ne batalas egale kontraŭ la simbooj de muziko, ĥemio kaj precipe matematiko? Sed la skribanto devas lasi tian argumenton al profesiaj psikologiistoj, dankema je la duobla certeco kiun li sentas, ke, se ĝi estas ne fortika, ili ĝin elrespondos; kaj, se fortikas, ĝi pezados kun ili solaj.

Tamen, laŭe de tiu principio, Doktoro Munsterberg skribas: “Tiu ĉi vera internacia lingvo de bonvoleco devige disvastiĝos ju pli rapide des pli valora nia klopodo lerni la lingvon fremdan”; ree, “la lingvo de bonvoleco ne povas esti malpli utila pro ia malsameco de dialektoj kaj elparolemoj.

Jen do estas la unu konstrua diro en la artikolego de okdek mil kvintcent vortoj: “Estas hodiaŭ necesa kaj ebla nur unu internacia lingvo; la lingvo de bonvoleco kaj paco kaj internacia amikeco akompanata de la serioza klopodo kompreni la emojn de niaj naciaj proksimuloj kaj honori iliajn penadojn. Kiel malhela la ideo de la aŭtoro estas! Ni supozas ke la “lingvo” kiun li proponas konsistas el manpremoj kaj ridetoj kaj “banzajoj.” “Unu esprimus ĝin angle, dua germane, alia ruse, france aŭ japane”. Ĝi farus malriĉan esprimon, “acidan vizaĝon,” laŭ mia metodo de pensado.

La leginto malsuprenmetas la ĵurnalon malkontenta. Li petis panon, kaj la skribinto donis al li ŝtonon; li petis fiŝon kaj estis donata al li skorpio. Cu la vorto “skorpio” tro forta? Mi ĝin uzas post pripenso. Manko de internacia komuniko estis estinta unu el la plej fruktaj kaŭzoj de milito kaj suferado en la terurega historio de la homaro. “Sed estas la Sorto” diras Herr Munsterberg. Nenio povas fari ĝi; nur bonsento unu al la alia.”

Kiam la granda pionira misiisto, Adoniram Judson, el-sipiĝis en Burmujo, li renkontis tiulandulon en la arbaro, kaj signalis supren al ĉielo. Tiu ĉi foriris kaj rakontis ke li estis anĝelon vidinta. Tiu estis la lingvo de “bonvoleco”!

Antaŭ kelkaj monatoj egale talenta viro mezaĝa eniris aŭdantarejon en Genevo, kie estis kunigataj personoj de ĉiu nacio, kun vizaĝoj brilaj kaj koroj plenegaj je la lingvo de bonvoleco. Kiam la aplaŭdego ekneniigis, vortoj (“ho, frazo, frazo, frazo, kiam vi ĉesos regni super la spiritoj de la homoj”!)—vortoj ekfalis el la noblaj lipoj, klaraj, elokventaj,

AMERIKA ESPERANTISTO

kaj familiaj kiel la tonoj de infaneco. "Sinjorinoj kaj sinjoroj"—(ĉi estas neĉies propra parolilo, eĉ ne tiu de la parolanto mem, sed la sonoj ŝajnis porti signifon tiel se ili tuŝadis kaŝatajn kordojn aŭ memorilojn antaŭnaskajn).

"Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas pro libereco, pro la plej elementa homa libereco, pro la rajtoj de homo. Tie ne homo de unu lando pro politikaj patrolandaj interesoj atakas homojn de alia lando—tie la naturaj filoj de sama lando ĵetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel same naturaj filoj de tiu sama lando nur ĉar ili apartenas al alia gento. Terura estas la stato de aferoj nun en la multelingva Kaŭzako, terura estas la stato okcidenta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo!"

Tiaj estis la unuaj sentencoj de la parolo de Doktoro Zamenhof ĉe la malferma kunsido de la Dua Internacia Esperantista Kongreso. Tiu estis la lingvo Esperanto.

LA SKIO.

De longe ne ekzistis vintro tiel favora por glatiri, kiel la nuna, kiu baldaŭ finos. La sportanoj skiaj nordaj havis bonan okazon por provi la alklimataĵon de ilia sporto en la regionoj orientaj de Francujo. Oni provis fari "Chamonix" la "Davos" (ĉefa urbo de la glatanoj en Svisujo) francan, kaj sindikato iniciatora organizis karavanon, kiu trairis "Lautaret" per glitveturilo, kaj povis alkonduki aron da sportanoj kaj ĵurnalistoj gravaj al "Briancon," kie okazis sur la neĝo konkursoj skiaj, kies la partoprenantoj estis nur *ĉasistoj alpaj, ĉu francaj, ĉu italaj. Generalo Gallieni, dum li plenumis funkciojn de inspektoro, venis por ĉeesti ĉe la "meeting" kaj ankaŭ venis multaj generaloj francaj kaj italaj. Famaj skiistoj norvegaj estis kunvokitaj, kaj faris la plej rimarkindajn ekvilibrilstaĵojn, sed la ĉeestantoj prefere atentis al militaj skiistoj.

La skio faras al garnizonoj alpaj la plej grandan servon, ebligante fari pli rapide, kaj pli ofte, la renoviĝon de la provizoj, en la malgrandaj postenoj starantaj sur la montoj en multe da lokoj iom altaj. Kuradoj tre rapidaj estas plenunitaj de niaj alpaj ĉasistoj.

Per la skio, oni efektivigas, sur la neĝo, saltojn nepre neordinaraj. Ofte oni vidas skiiston transirantan, saltante, dudek-kvin metrojn, kaj la norvego, Nils Gestrand, dum la lastaj provoj, transiris, antaŭensaltante je alteco sufiĉe granda, kvardek-kvar metrojn.

AMERIKA ESPERANTISTO

Sed tamen, ia ekzercado kutima estas necesa, por ke oni fariĝu bona skiiisto. En la komenco, la malfacilajoj kaj penadoj estas multaj. Ne estas facile bone direktu la skion, kiu konsistas el maldikaj tabuletoj, kies la longo superas unu metron. Precipe, kiam oni falas, oni estas devigita solvi la problemon malfacilan por sin relevigi, ĉar la piedoj estas ĝenataj de tiuj aparatoj obstrukciantaj. Tenteante per la manon la glacipikilon, metante la du piedojn paralelaj, unu iom antaŭ la alia, oni devas kliniĝi antaŭen por la foriro. Tiam la malfacilajoj komencas. Tiuj skioj diablaj havas la bedaŭrindan instigon por sin almeti laŭlargē. Tamen, uzinte iom da pacienco, oni vidas la finon de la lernado. Tiam, en tiuj landoj, kie la neĝo kovras la teron dum multaj monatoj, oni havas por la translokado rimedon pli rapidan ol piediradon.

(Artikolo elprenita el "Journal Le Chapeur Francais."
Tradukis Alfred Poitard, de Pierre, Francujo.)

LA GAZETARO ESPERANTISTA

"The British Esperantist.—La januara eldono prezentas gravan plibonigon—pli fortan kovrilon jam longe bezonita. Kiam ĵurnalo ne forte bindita transiras la maron, ĝi ofte atingas la celon iomete malbonkondiĉa (france, "hors du combat"). Gi ankaŭ ellasis la aldonon, kaj en la estonteco ĉiu abonanto ricevos la tutan eldonajon de 24 paĝoj.

Antaŭen Esperantistoj!—La perua eldono prezentas dekses paĝojn, havantajn kolonojn paralelajn esperantajn kaj hispanajn. Nun ĝi estas en la kvara jaro de ĝia vivo.

Ruslanda Esperantisto.—Iomete malfruiĝante, tiu ĉi bona gazeto estas facile pardonebla, havante bonan tradukon el Leonid Andrejev, "La Kristanoj". El la pola ĝin tradukas N. Novicki. Gravan sciigon enhavas ankaŭ la nomita ĵurnalo pri la esperantista movado tra la tuta mondo. Tre bedaŭrindan informon ĝi donas pri la memmortigoj de du junaj rusaj esperantistoj, kaŭzitaj de aferoj politikaj.

La Pola Esperantisto.—En la urbo Lvovo, provinco de Galicio, Aŭstrujo, eldoniĝas organo de la polaj esperantistoj. Gi enhavas sesdek paĝojn, kun pola kaj esperanta lingvoj flanke ĉe flanke. Bonan artikolon enhavas la decembra eldono, de Sro. Witold Skalski, pri "La Patriotismo kaj la Artefarita Internacia Lingvo."

La Revuo.—En tiu ĉi tre grava revuo aperas, januare, la fino de la komedio tradukita de Doktoro Zamenhof el la rusa de N. V. Gogol. Estas ankaŭ artikolo de Kabanov,

AMERIKA ESPERANTISTO

Vincente Inglada, R. Deshays, Leono Zamenhof, R. von Melckebeke. En la kronika fako aperas tre grava rakonto de Paul Berthelot pri lia vojaĝo al Suda Ameriko kaj liaj klopodoj tieaj por Esperanto.

Germana Esperantisto.—En la januara eldono de tiu ĉi revuo aperas kuraĝiga informo pri la progreso farata en Germanujo. Sro. J. Borel, la ĉefredaktoro, donas postrigardon de la tutmonda esperantista movado dum la jaro 1906a, al kiu, se ne mankus lokon, ni donus represigon.

La Belga Sonorilo.—Tre vere sonoras la januara numero. Iomete malpligrandigita (12 paĝoj) ĝi enhavas plej gravajn sciigojn por la mondo esperantista. La delegacio por alpreno de internacia lingvo helpanta estas alvokita por kunvenu en Vieno dum la estonta somero por elekti fine tion kion ĝi faros. Sendube la elekto de la dirita delegacio estos la lingvo Esperanto.

La Suno Hispana.—En la decembra numero aperas la parolado de Zamenhof ĉe Genevo, esperante kaj hispane redaktata. La ĵurnalo pritraktas grandan progreson de la lingvo en Hispanujo.

Espera Pacifisto.—La septembra-oktobra eldono enhavas sesdek-ok paĝojn tre interesajn pri la internacia pacifisma movado.

Tra la Mondo.—Tiu ĉi bele ilustrata kaj bone redaktata gazeto enhavas, en la decembra numero, dekses paĝojn da esperantaĵo de tre diversaj nacioj. Pri ĝia graveco por la afero de Esperanto oni ne bezonas multon diri—kiel estas la angla diro, “ĝi parolas por si mem.”

La Pioniro.—Tiu ĉi gazeto, imitinde presata, sciigas pri la plaĉa progreso kiun faras la lingvo nun en Hindujo (kvankam ĝi insiste diras ke la pli bona vorto estas “Indio”).

Foto-Revuo Internacia.—Ne estante fotograf-amanto, oni ne povas digesti la enhavon de tiu ĉi gazeto. Laŭdinde ĝi entreprenas la eldonon de vortaro por la fotografarto.

Unua Pašo.—Kredeble en Bulgarujo la fandistoj de la preslitaro jam ne fabrikas la literojn supersignitajn por Esperanto. Tiu ĉi bona revueto, ĉiam interesa, ne senkuraĝigis pro tio, sed eliras tre regule per mimeografo. Gi estas mirinda eldonajo.

“Esperanto.”—Tiel nomas sin la organo oficiala de la Hungara Societo Por Esperanto, kiu eldoniĝas ĉe Budapesto. Gi eliras nur kvaronjare, sed la kajero ricevita montras tre gravan progreson ĉe la hungaroj. Gi enhavas kelkajn originalajn verkojn de hungaraj esperantistoj.

The American Esperanto Journal.—La unua numero de tiu ĉi nova, kvankam de longe promesita ĵurnalo, aperas dat-

AMERIKA ESPERANTISTO

umita januaron, 1907an. Estante organo oficiala de The American Esperanto Association, ne estas necese ke oni diru ke ĝi estas bona afero por Esperanto. Gi havas kiel redaktoro ĉefa, Sro. John Fogg Twombley, de Bostono; redaktoro de novajo, Sro. Edward K. Harvey, sama adreso; kaj la eldonisto kaj administranto estas Sro. Stephen W. Travis, Jr., de Brooklyn. La enhavo de la januara numero, krom la kutimaj salutoj kaj esprimoj de espero, estas: Historieto de Esperanto; letero de Doktoro Zamenhof kaj Sro. de Beaufront; tre entuziasma letero de Profesoro Huntington pri la Geneva Kongreso; simila letero de Prof. Grillon; letero de la Germana Esperantisto; kroniko pri la progresado de Esperanto en Ameriko; daŭrigota traduko el la verko de Edward Everett Hale, "The Man Without a Country" (La Viro Senpatruja). Al la American Esperanto Journal ni deziras longan, feliĉan kaj utilan vivon; kaj al la redaktoroj, administranto, subapogantoj kaj abonantoj, tute la saman, aldonante feliĉegajn edziĝojn kaj multe da infanoj. Ilia nombro ĉiam kreskegu!

LA TRIA KONGRESO.

La Trio por La Tria (tiel nomas sin la komitato ĉefa por la tria internacia kongreso de Esperanto, ĉe Cambridge, Anglujo) deziras danki ĉiujn samideanojn kiuj jam sendis pošt-kartojn por sciigi sian intencon ĉeesti, laŭ la peto presita en decembra "British Esperantist." La nombro da poštkartoj ricevitaj estas tre kuraĝiga.

La plej grava okazintaĵo de la lasta monato rilatas al la "Union Society." Tiu ĉi estas klubo de la universitataj studentoj, kaj havas tre gravan influon. Ĉe la kunveno de novembro estis unuanime decidite rajtigi Esperantistojn kiel honoraj membroj dum la kongresa semajno.

Plie, la Debating Hall (paroladejo) estas proponita al la organiza komisio por diversaj gravaj kunvenoj. Kiam oni memoras ke la lasta fojo kiam la ĉambrego (kiu estas la parlamentejo de la universitato) estis pruntedonita, estis en 1885, oni plene komprenos la gravecon de la honoro proponita al ni.

La urbestrino afable konsentis prezidi la akceptan komitatton por sinjorinoj, kaj La Trio fervore esperas ke granda nombro da kongresaninoj ĉeestos por vidigi la gravan rolon luditan de niaj tutmondaj samideaninoj.

La Trio kredeble havos pluajn kuraĝigajn sciigojn por anonci post mallonga tempo, kaj ĝi dume esperas ke ĉiuj helpantoj bonvolos konigi kongresajn avizojn al siaj amikoj, kaj instigos ankaŭ ilin ĉeesti.—El "The British Esperantist."

AMERIKA ESPERANTISTO

AUTOGRAFA LTERO DE ZAMENHOF.

La firmo "Stephens' Inks," Londono, disdonas al ĉiuj petantoj ekzemplerojn bone litografitajn de la sekvanta letero de Dro. Zamenhof, pri kiu ni konsilas al ĉiu esperantisto ne sole ke li petu la leteron de Inkoj de Stephens, sed ke li ĝin atente legu kaj sendu la informon deziratan al Dro. Zamenhof:

(Cirkulera Letero).

La glorie konata firmao "Stephens' Inks" afable proponis al mi, ke ĝi dissendos al ĉiuj esperantistoj ian leteron, kiun mi deziras adresi al ili. Farante uzon de la dirita propono, mi petas nun, ke ĉiu esperantisto volu sendi al mi, sur aparta papereto, sen ia alia alskribo, kaj klare legeble, la sekvantan letereton, kiu helpos al la aranĝo de tute ĝusta adresaro de esperantistoj. Kun saluto al ĉiuj esperantistoj,

L. ZAMENHOF.

Al Sro. L. Zamenhof, Str. Dzika No. 9, Varsovio:

Responde al via cirkulera letero, dissendita per la firmao Stephens' Inks, mi sciigas vin ke mi akceptas leterojn en Esperanto, kaj mia hejma adreso estas la sekvanta:

Regno:

Lando:

Provinco:

Urbo:

Strato:

Domno:

Persona nomo:

Familia nomo:

Profesio aŭ specialeco:

Âgo:

Subskribo:

Ciuj Esperantistoj estas insiste petataj diskogi kiel eble plej vaste tiu ĉi leteron. Ni plezure sendos al ĉiu petanto ekzempleron de ĝi.—"Inkoj de Stephens," Londono.

